

& Demonoj:

< Ripete 17 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Aleksandr Puŝkin. El rusa tradukis Mikaelo Bronŝtein. Baladigis Martin Strid (2015) per modifita popolmelodio sveda "Leksmarschen" kaj nova rekantaĵo. Klarigo (*): '3 Jamŝĉiko: Rusa '5 Stalono: ĉevaluĉo. '6 Versto: rusa mezuro, 1067 metroj.>

(#Melodio:

<:31> (

/LATILASI LATI Do Doo;MiRe TISO TIRe LA; MiFiMiRe MiFi So Soo;TiLa FiRe FiLa Mi ii;DoRe MiLa LaTiLaSo LaSo ; Mi3Fi SoMi FiRe Mi Mi;LA Re3Fi LaSo Fi Mi;Re DiLA TISO LA LA

)×14)+

(& Strofoj:

'1 /Nuboj flugas, nuboj volvas; en fantoma luna hel' ; hasta neĝo fluge polvas. ; Morna nokto, morna stel'.
(×: **kaj ni flugas tra la nokto nigra ; per magia ĉi rakonto, ; do dancu ĉiam vigla ; trans jen fabela ponto.**)

'2 Kampo, kampo malsarena, ; nur tintilo: din-din-din. ; Volnevole vast' ebena ; trompas min, timigas min.

'3 - Ek, jamŝĉik*! - Ho ne, sinjoro! ; Por ĉevaloj peza tren', ; la okulojn gluas ŝtormo, ; mankas vojo sur eben'.
.....

'4 Ve! Eĉ spuron mi ne vidas! ; kion faru ni en sol'? ; Kampe diablo nin misgvidas, ; rulas nin laŭ sia vol'.

'5 Vidu, jen, jen ĝi ribelas, ; prancas kun ĉevala hen', ; jen stalono* nian pelas ; sovaĝintan al raven'.

'6 Jen ĝi misan verston* montris ; antaŭ mi en neĝa fum', ; jen fajrere ĝi ekmontris ; kaj degelis en mallum'.

'7 Nuboj flugas, nuboj volvas; en fantoma luna hel' ; hasta neĝo fluge polvas. ; Morna nokto, morna stel'.

'8 Ĉesis tinto, sledo haltis, - ; ni senfortas vagi plu... ; - Vidu, kiu kampen saltis? ; - Dio scias! Ŝtupo... lup'!... ..

'9 Vent' malicas, vento muĝas, ; la ĉevaloj en stertor'; - jen ĝi ien salte fuĝas, ; okulumas nin en for'.

'10 Kaj denove rajd' senbrida; La tintilo: din-din-din... ; Amasiĝas gent' spirita ; en ebena blanka sin'.

'11 Sen mezuro, ekster klaro ; sub malhela morna lun' ; flirte ŝajnas demonaro ; foliaron en aŭtun'.

'12 Kien ili! Kion kantas ; en sopir'? Laŭ kies vol'? ; Ĉu al sorĉa nupto hantas, ; aŭ al tombo de kobold'?

'13 Nuboj flugas, nuboj volvas; en fantoma luna hel' ; hasta neĝo fluge polvas. ; Morna nokto, morna stel'.

'14 La fantomoj are, are ; en senlimo flugas for. ; Per plorego pende, knare ; ŝiras vundon en la kor'.)